

Sacrata nobis gaudia

Brevier-Himno

Komunaj tekstoj > pluraj pastroj > vespera laŭdo

*Sacrata nobis gaudia
dies reduxit annua,
laudantur in qua debito
cultu duces ovilium.*

*En pro gregis custodia
nullos labores neglegunt,
tutantur illum, sanius
impertientes pabulum.*

*Arcent lupos e finibus,
procul latrones exigunt,
replent oves pinguedine,
ovile numquam deserunt.*

*Tot nunc potiti gaudiis,
gregum duces sanctissimi,
nobis rogate gratiam
apud tribunal iudicis.*

*Æterne, Christe, pontifex,
tibi sit æqua gloria
cum Patre et almo Spiritu
in sempiterna sæcula.*

Amen.

latina T: Biagio Verghetti († 1941)

Ho ĉiujara sankta ĝoj!
La hodiaŭa tag' al ni
donacas laŭdi laŭ la ord'
paŝtistojn plurajn en komun'.

Jen ili viglas por la greg',
por ĝi laboras kun atent',
ĝin gardas, por ke trovi ĝi
sanigan nutron de l' spirit'.

Ŝtelistojn ili pelas for,
kaj tenas lupojn ekster bar',
kaj zorgas pri la bona fart'
de l' grego, ne forlasas ĝin.

Paŝtistoj sanktaj, vi kun ĝoj'
nun loĝas en ĉiela glor':
elpetu gracon vi por ni
ĉe l' tribunalo de l' Juĝant'.

Paŝtisto bona, Krist' Jesu',
al Vi eterne estu glor'
kun Viaj Patro kaj Spirit'
tra ĉiu tempo kaj eon'.

Amen.

E: Albrecht Kronenberger 2008